PartoprenKontrakto en
" kompilo *(Nomo de la kompilo)*"

- Kompilo Eldonkontrakto -

Inter la muzikbando/artisto/kantisto
nomo de la bando aŭ artisto :
reprezentita de :
funkcio :
adreso kompleta :
kodo kaj urbo□
lando□
tel/faks :
reto :

kaj la diskeldonejo *(Nomo de la eldonejo)*
reprezentita de :
funkcio :
adreso :
kodo kaj urbo□
lando□
tel :
faks :
reto :
TTTejo :

Estis interkonsentitaj ambaŭflanke jenaj kondiĉoj :

-1. La muzikbando alportas siajn esperanto-titolojn elektitajn kun interkonsento de *(Nomo de la eldonejo)* sur DAT-kasedo miksita, finpretigita kaj registrita en frekvenco 44,1 aŭ sur KDR (registrebla KD gravurita je "disc at once") preta por la mastrigo .
Prefere *(Nomo de la eldonejo)* ricevu surkasedan , MD-an aŭ KDR-an demon antaŭ definitiva registrado/miksado (okaze se indas fari plibonigojn aŭ korektojn).
La limdato por sendi la definitivan registrajxon estas la ……..de ….. 20……. Poste ne eblos garantii ke viaj kontribuoj povos aperi la kompilo «□Nomo de la kompilo□.

-2. La muzikbando transprenas la produktokostojn.

-3. *(Nomo de la eldonejo)* rajtas rifuzi surbendigon kies teknikaj, artaj kaj lingvaj kvalitoj ne atingas la bezonatajn kondiĉojn por altkvalita produktado.

-4. La surbendigo apartenas al la bando/artisto/kantisto, kiu rezervas por *(Nomo de la eldonejo)* antaŭ la eldono de la disko ekskluzivecon de tiuj esperanto-versioj dum periodo de duona jaro. Tri (3) jarojn post la apero de la lasta eldono la rajtoj de la eldonado revenos al la bando. *(Nomo de la eldonejo)* daŭre rajtas publikigi kantojn varbcele en la interreto kun komuna interkonsento.

-5. *(Nomo de la eldonejo)* al kiu la surbendigo ne apartenas, ne povas ĝin uzi sur alia fonogramo sen permeso de la bando.

Tiu kontrakto donas neniun ekskluzivecon por eldonado aŭ produktado alian ol tiu indikita en la ĉi supra artikolo n-ro 4.

-6. KD (kompaktdisko) estos la sonportilo.

-7. La unua eldonkvanto estos minimume …….KD-oj.

-8. *(Nomo de la eldonejo)* mem elektos la kovrilon kaj enhavon de la KD-libreto. En ĝi troviĝos la tekstoj de la kantoj en esperanto, kontaktadreso kaj laŭeble foto de la artisto/bando (nigrablanka aŭ kolora).
Ankaŭ la limdato por sendi la definitivajn korektitajn tekstojn, kontaktadreson kaj fotojn estas la …….a de …….. 20…..
Sen ĉiuj ĉi supre menciitaj elementoj ne eblos partopreni la kompilon.

-9. *(Nomo de la eldonejo)* mem decidos pri la elekto kaj ordo de la kanttitoloj en la " kompilo (titolo de la kompilo)".

-10. Ĉiu persono kiu estas parto de la kontribuanta muzikgrupo ricevos po unu senpagan ekzempleron de la "kompilo (titolo de la kompilo)".
Bonvolu plenigi la informslipon aldonita fine de la kontrakto.
Estas tamen limigita kvanto je 5 (ĉar ekzemple ne eblus doni senpagajn ekzemplerojn al gasta ĥoro de 100 personoj !).
Ĉiu senpaga KD kiun ricevos la artistoj estos subtrahita de la vendobazo uzata por la kalkulo de la tantiemoj.

-11. Ĉiu bando/artisto/kantisto profitos favoran tarifon se ili deziras pliajn ekzemplerojn por disvendi aŭ donaci : …… SI (……. KI) + sendokostoj.

-12. *(Nomo de la eldonejo)* rezervas 100 ekzemplerojn por la varbado en la gazetaro (ne disvendataj) kiun *(Nomo de la eldonejo)* mem faras.

-13. Vendo-prezoj aplikataj

-a) La alpublika tarifo (katalogo de *(Nomo de la eldonejo)*) estas …….. kun imposto (AVI) + sendokostoj.
-b) Estas konsnetita rabato (pogranda prezo) por la libroservoj kiuj mendos pli ol 5 ekzemplerojn (tio estas …… senimposta [kun AVI] …… + sendokostoj)

-c) La muzikbando povas profiti favoran tarifon (definita en la punkto 11)

-14. Financoj
Du eblecoj⊡

a) 10% da tantiemoj estos kalkulitaj el 90% de la vendoj (laŭ la pogranda prezo SI) dispartigitaj laŭ la kvanto da titoloj en la kompilo kaj pagita al ĉiu bando/artisto laŭ la respektiva nombro da titoloj en la diskoj.

b) Kiel pago de la tantiemoj anstataŭ mono, eblas ricevi ekvivalenton de tiu sumo per diskoj kalkulita laŭ la pogranda prezo SI surbaze de ……. KD-oj disvenditaj.

-15. Reeldono
Okaze ke dua, tria aŭ eĉ plia eldono estos bezonataj, la bandoj/artistoj donas la rajton al *(Nomo de la eldonejo)* por ilin fari.
La bandoj/artistoj estos informitaj pri la precizaj eldonkvantoj de la dua kaj, tria aŭ pliaj eventualaj eldonoj.
Ne eblos reeldoni la diskon sen la konsento de la bandoj/artistoj/kantistoj.
La kondiĉoj de la reeldono restos samaj kiel tiuj de la unua eldono.
La bandoj indikos fine de la kontrakto kiamaniere la tantiemoj devas esti pagitaj (ĉu per mono je elĉerpiĝo de la eldono ĉu per diskoj tuj je
apero).

-16. En kazo de malapero de *(Nomo de la eldonejo)*
Se *(Nomo de la eldonejo)* malaperus la bandoj/ artistoj ricevus la restantan stokon de la eldonitaj diskoj kaj pagus ilin laŭ produkta kosto + la sendokostoj).

-17. Garantio de la artisto
La artisto garantias ke li posedas la uzorajton de ĉiuj samplaĵoj uzitaj.
Plie li garantias keĉiuj aliaj nesubskribintaj membroj de la grupo aŭ eventualaj gastmuzikistoj / gastkantistoj konsentas pri la supraj kondiĉoj. Se poste montriĝas ke samplaĵoj estis uzitaj kontraŭ la tiam ekzistanta kopirajto aŭ ke personoj por en kies nomo la artisto reprezente subskribis ne
konsentas pri la supre menciitaj kondioj, tiam *(Nomo de la eldonejo)* postulos de la artisto la repagon de ĉiuj kostoj kiuj estiĝas pro tio.

-18. Se la artisto uzas komponaĵon de alia artisto
(Nomo de la eldonejo) postulas kopion de la kopirajta permeso subskribita de la origina komponisto kaj permeson de la diskeldonejo se la koncerna muzikaĵo estis eldonita.

La diskeldonejo *(Nomo de la eldonejo)*
kaj la nuzikbando/artisto/kantisto⊡

Interkonsentas pri ĉiuj kondiĉoj de tiu ĉi kontrakto.

Por la pago de la tantiemoj de la unua eldono la bando
elektas⊡
[ ] ricevi la monon post la vendo de la unua eldono.
[ ] ricevi definitan kvanton da diskoj tuj post
la apero.
(krucigu la deziratan elekton)

Tiu ĉi kontrakto konsistas el kvar (4) paĝoj plus informslipo farita en
du (2) ekzempleroj.

Nome de *(Nomo de la eldonejo)*

Legite kaj aprobite
Loko :

Dato :
Subskribo kaj stampo⊡

Nome de la artisto⊡
Legite kaj aprobite
Loko :
Dato :
Subskribo⊡

Informslipo

nomo de la bando/artisto :

kontaktoj de la bando / artisto aperonta en la KDlibreto.
kompleta adreso :

telefono :
fakso :
retadreso :
TTTejo :

la bando konsistas el :

- persona nomo :
familia nomo :
pseŭdonimo :
funkcio en la bando (instrumento ludata) :

- persona nomo :
familia nomo :
pseŭdonimo :
funkcio en la bando (instrumento ludata) :

- persona nomo :
familia nomo :
pseŭdonimo :
funkcio en la bando (instrumento ludata) :

- persona nomo :
familia nomo :
pseŭdonimo :
funkcio en la bando (instrumento ludata) :

- persona nomo :
familia nomo :
pseŭdonimo :
funkcio en la bando (instrumento ludata) :